2 7 -06- 1988

# Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

8a jarkolekto n-ro 4
aprilo 1988

**Informilo**, kadro-revuo de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. - Jarabono: 150 BEF - Kontoj: 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 - Respondeca eldonanto *(verantwoordelijke uitgever)*: Monique Caestecker, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge.

**ESTRARO**

Ivo Durwael, prezidanto, Paul Gilsonlaan 5, 2520 Edegem, tlf. (03) 440 30 92.
Edward Symoens, vicprez., Putsesteenweg 131 A, 2180 Kalmthout, tlf. (03) 666 62 66.
Monique Caestecker, sekretario, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge, tlf. (091) 57 63 84.
Jan Bovendeerd, konsilanto, Meidoorn 42/2, 2510 Mortsel, tlf. (03) 449 50 06.
Roland Rotsaert, financoj, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, tlf. (050) 33 00 04.
Alex Humet, instruado, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem, tlf. (03) 239 21 69.
Hilde van Ingelgem, grupa agado, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst, tlf. (053) 70 50 11.
Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3538 Houthalen, tlf. (011) 52 19 43.

**KOMISIONOJ**

**Financoj**: Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.
**Eldona agado**: Chris Declerck, Amerikalei 135/2, 2000 Antwerpen, kaj Paul Peeraerts.
**Manlibro de la aktivulo**: Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3030 Heverlee, tlf. (016) 20 14 53.
**Gazetara servo**: Herman Deceuninck, Villalaan 1 b. 4, 1500 Halle, tlf. (02) 360 17 22.
**Rebata servo**: Germain Pirlot, Kemmelbergstraat 5/3, 8400 Oostende, tlf. (059) 70 87 00.
**Instruado**: Petro de Smedt, Hemelstraat 44, 9330 Dendermonde, tlf. (052) 21 26 77.

P R O T O K O L O

de la F.E.L.-estrarkunveno de sabato la 14an de majo 1988 en Antverpeno

Ĉeestis : Monique Caestecker (MC), Ivo Durwael (ID), Alex Humet (AH), Paul Peeraerts (PP), Roland Rotsaert (RR), Hilde Vaningelgem (HV).
Komenca horo : 10h15
Prezidis ID, protokolis MC.

Ĉar estas la unua fojo post la elektoj ke la estraro kunvenas, la taskoj estas dividitaj kaj akceptitaj (vidu titolpaĝon).

I. ANTAŬA PROTOKOLO

- aldoni la telefonnumeron de MC kaj AH
- aldoni la adreson kaj telefonnumeron de Jos Vandebergh, nova estrarano
- rilate al la punkto I paĝo 3 S-ro Texier, bonvolu legi : "La dato ŝanĝiĝis al la 7-a de majo. Ĉar la personoj kiuj partoprenis la laborplanojn ne povas iri al Parizo je tiu dato kaj por eviti ke ni devus sendi anstataŭanton nespertan, ni decidis ne partopreni la kunvenon. ID informos s-ron Texier tiurilate".
ID pli amplekse sciigis al s-ron Texier pri la kialoj de nia neĉeesto.
- punkto III.3 paĝo 14, bonvolu legi la titolon :
  3. Informpetis pri aliĝo.
- punkto VI paĝo 14, bonvolu legi : "S-ro Germain Pirlot ne haltis la rebatan servon sed plendis pro ne sufiĉe da kunlaborantoj. Li krome informis nin ke - se tiu situacio restas - estos la lasta jaro ke li priokupas sin kun la rebata servo."
La aliaj partoj de la protokoloj estas aprobitaj.

II. DEPONO DE LERNOLIBROJ

(vidu ankaŭ punkton I.1 paĝo 4 de la antaŭa protokolo)
Ĉiu grupo kiu ĝis nun akceptis tiun proponon, sukcesis.
Ni aparte deziras instigi la aliajn grupojn kiuj ĝis nun ankoraŭ ne decidis.

III. "EUROPALIA 1989 JAPANUJO"

Raymond Wylleman el Oostende skribis leteron en kiu li petas ke ni montru la praktikajn eblecojn de Esperanto en tiu manifestacio. Ĉu ni ne atendu la unuan paŝon de "Europalia" mem ?
Estas ankaŭ propono de s-ro Van de Kieboom, kursanto el Oostende, kiu rilatas eksperimenton kun japanaj komercistoj en la UK en Roterdamo por plifortigi la rilatojn inter Japanujo kaj Eŭropo. ID kaj RR okupiĝos pri eventuala kontribuo. ID priparolos buŝe la konkretajn petojn kun kelkaj homoj el Oostende okaze de ĉeesto en la kunveno tie sekvontan semajnon.

IV. LINGVO- KAJ LIBROBORSO

Marc vanden Bempt volas aranĝi grandan borson en Loveno. Li jam ellaboris la tutan ideon surpapere kaj nun komencas konkrete esplori. La estraro kompreneble apogas tiun ideon kaj, en kazo de neceso, povas helpi per diversaj rimedoj. MC skribe sciigos tion al Marc.

V. V.T.B.

Iam ni faris interkonsenton kun VTB pri vojaĝoj de niaj membroj pere de VTB.
FEL por 1987 ricevos 3000 BEF kiel peranto pere de Annie De Smet. Esperantistoj kiuj deziras vojaĝi preferieble do organizas iliajn vojaĝojn pere de Annie (telefonnumero 053/774497) ĉar evidentiĝas ke VTB estas amika asocio.

VI. BUSVOJAĜO AL BRIGHTON

Pierre De Backer el Kortrijk petis ĉu FEL organizos busvojaĝon al Brighton en 1989 por la kongreso. Ekzistas mallongaj vojaĝoj ("minitrip") de la NMBS, inkluzive trajn-/ŝipbiletoj kaj hotelo, kiuj povas esti plilongigitaj ĝis 9 noktoj. ID esploros la aferon kaj informos pri tio.

VII. EŬROPA FESTIVALO "THE WORLD WE CHOOSE" 23-24-25.IX.1988

(vidu ankaŭ punkton II de la antaŭa estrarprotokolo)
Ni decidis pri partopreno.

VIII. SEMAJNO DE LA INTERNACIA AMICEKO (SIA)

UEA serĉas fidindan komisiiton pri la SIA kiu pretas kunordigi internaciskalajn preparojn ĉiujare.

IX LA LABORPLANO

Post kelkmonata laboro per tiu plano, ni povas klare difini kvar celojn :
- financoj (respondecas ID, PP, RR)
- varbado (veki la atenton de neesperantistoj)
- kursoj (respondecas AH)
- servoj (por konservi la ligojn kun personoj kiuj finis la kurson ekz. libroservo, perado de revuoj, vojaĝservo, ...)

X. "MONATO"

Denove aperos 12 numeroj jare.
Ni faros varbkampanjon inter homoj kiuj partoprenas al la UK en Roterdamo kaj kiuj ĝis nun ne abonis la revuon.

XI. ELDONA AGADO

Antaŭvidiĝas eldono antaŭ la UK de tri libroj :
- Murdo en Esperantujo - Daniel Moirand
- Vojaĝoj finiĝas. Amantoj kuniĝas - Manjo Austin
- Scenaro de la tria mondmilito de Władysław Biernacki en traduko de Manuel Halvelik. Tiu tre interesa libro ĵus aperis kaj estas jam havebla ĉe FEL.

XII. VENONTA KUNVENO

je la 11-a de junio, en kiu ni ĉefe difinos la celgrupojn de nia agado por konkreta kampanjo kaj preparo por la ĝenerala kunveno de septembro-oktobro kun la respondeculoj de ĉiu Esperanto-grupo. Krome estos ampleksa kunveno de la financa komisiono.

---

POST JUBILEO ... LA PEREO ???
En 1987 ni registris en januaro kaj februaro 21 gazetartikolojn, 14 radio- kaj 1 televid-elsendojn.
En 1988 ni ricevis eltranĉaĵojn de 5 gazetartikoloj dum la sama periodo.
Tiuj kiuj okupiĝas pri gazetaro nepre ree aktivu !!!


## JARRAPORTO 1987.

En ĉi tiu jaro la funkcioj de la estraro estis fiksitaj. La estraro 11-foje kunvenis.
Malfeliĉe ni perdis kiel estraranon nian amikon Louis Callebaut, kiu forlasis nin por vivi en Hispanujo.
Ni ankàu perdis pioniron de la grupo : Robert De Kegel. S-ro De Kegel estis unu de la fondintoj de la Aalsta grupo en la jaroj inter la du militoj. En la plej frua raporto - Sept. 1930 -,kiun ni disponas, ni jam trovis sian nomon Kvankam li jam delonge loĝis en Charleroi, li fidele pagis sian kotizon al nia grupo. Li ankàu partoprenis la FEL-kongreson en Aalst en 1984. Ni rememoru lin.
Grupkunvenoj okazis ĉiumonate escepte de Julio kaj Augusto. La plej gravaj okazintaĵoj estis :
- prezentado de lumbildoj pri Ĉinio fare de Katja Lödör.
-Disdono de la diplomoj al la sukcesintoj gelernintoj.
-Lumbildoj pri fàuno kaj flàuro en la Ardenoj fare de Clement.
-Prezentado de kantoj kaj dancoj fare de Pola folklora grupo en la kadro de la 100-jariĝo de Esperanto.
-Serĉpromeno en la urbo.
-Barbekjuo en la ĝardeno de Erik.
-Promenado en la Clementaj Ardenoj.
Normale, 15o da membroj partoprenis la kunvenojn. Kelkaj fojoj, okaze de interesaj eventoj, eĉ multe pli.
"La Pioniro", bele prezentita, aperis regule ĉiu monato kaj ĉiam ĝustatempe. Pluraj membroj ensendis kontribuon, kvankam la plej granda laboro restis por nia prezidanto.
Pro malsano de la kutima kursgvidanto neniu elementa kurso okazis. Tio estas malbona afero ĉar ni tiel perdas certan varbeblecon.
La membronombro stagnis.

LA INTERHOMAJ RILATOJ EN F.E.L.

## ESTRADPROBLEMOJ

Eric Berne, la fundamentisto de Transakcia Analizo faris jenan skemon pri la konsisto de societo :




Li konstatis ke la atakoj de nemembroj al la ekstera ĉeflimo (kritikoj, malhelpoj, ...) ne endanĝerigas la vivon de iu grupo. Kontraŭe eĉ, kritikoj kaj veraj atakoj plifortigas la koherecon. La membroj tiam volas dediĉi multe pli da energio por vivteni la tuton.
La danĝero estiĝas je la transiro de la interna ĉeflimo. Se membroj komencas kritikegi sian estraron, opinias ĝin nebona aŭ precipe, se iuj volas okupiĝi pri estraraj devoj (ofte en la nomo de demokratieco !) tiam la grupo komencas disfali. Tio tute ne signifas ke la membroj ne rajtas kritiki kaj devas muti; certe ne.
Tio jes signifas ke devas esti klara, kiu finfine prenos decidon post diskutado. La mizero nur komenciĝas se iu membro faras decidojn aŭ paŝojn anstataŭ la estraro.
La supra konstato ankaŭ ne signifas ke nur 1 persono devas decidi ĉion sola. La decidpovo troviĝu ĉe (tamen nur kelkpersona) grupo da homoj. Se societo tiel funkcias, tiam energio liberiĝas por okupiĝi pri la veraj celoj de la grupo.
Tiu skemo certe ne estas pledo por diktatoreco.
Ĉu diktatoreco ne estas konstanta incito de la membroj por ataki la estraron ?
Kiel eblas solvi internan konflikton ? Nu, tiaj problemoj povas solviĝi nur ene de grupo kiu spertas la konflikton.

Tamen mi volas mencii 2 ideojn :
- kiam mi estis prezidanto de La Verda Stelo, dufoje mi "forpelis" homojn kiuj atakis la gvidlinion. Mi faris tion ĉar ili agis tiel individuisme. Mi sentis ĝeneralan malaprobon de ilia konduto. Mi suferis antaŭ ol preni la decidon ... sed neniam bedaŭris ĝin.
- foje okazas ke membro memstare prenas iniciaton ... kaj ricevas aprobon de multaj membroj. Tio estas belega signalo ke tiu homo estas preta por eniri la estraron kaj eĉ eventuale anstataŭi la gvidanton. Kial tio ne efektiviĝu ??

ID

PROTOKOLO DE LA FEL-ESTRARKUNSIDO JE SABATO LA 11AN DE JUNIO 1988 EN ANTVERPENO

---

Ĉeestis : Jan Bovendeerd (JB), Monique Caestecker (MC), Ivo Durwael (ID), Alex Humet (AH), Paul Peeraerts (PP), Roland Rotsaert (RR), Edward Symoens (ES).
Senkulpigis : Hilde Van Ingelgem (HV)
Komenca horo : 12h
Prezidis ID, protokolis MC

Pro la amplekso de Informilo (organigramo) kaj novaj poŝtaj regularoj, la antaŭa protokolo ankoraŭ ne aperis.

PLANADO

La estraro sufiĉe detale priparolis la planon kiun vi trovas ĉi kune kun klarigaj vortoj de ID. "La difino de la celgrupoj" estos temo de aparta kunveno por la komitatanoj je la 8a de oktobro 1988.

ŜANĜIGO DE LEĜOJ RILATE AL LA MILITSERVO

Estas propono ke homoj povas fari ilian militservon en organizaĵoj kiujn ili mem rajtas elekti. Se tiu decido estos definitiva, ni volonte akceptos por la Centro tiujn homojn kaj diskonigos nian pretecon.

SEKVONTAJ ESTRARKUNSIDOJ

10.IX - 8.X (posttagmeze ĝenerala kunsido) - 5.XI - 10.XII.

---

Malferma estrarkunsido de FLEJA je 28/5/88 ĉe Patrick Haerick en Gentbrugge.

Ĉeestantoj: Katrien Batsleer, Patrick Haerick, André Ruysschaert, Jean Pierre VandenDaele.
Senkulpigis: Wim Tytgat.

Komenco: 10h30.

1. Financoj kaj estraro:

pro neĉeesto de Wim kaj Carl la pritraktado de la nuna financa situacio kaj revizoro devas esti prokrastitaj.
La letero kun la nova FLEJA-estraro, destinota por la ŝtatgazeto estas subskribita fare de ĉiuj estraranoj escepte de Carl. André sendos ĝin al li por ke Carl subskribu kaj sendu ĝin al la koncerna instanco. Patrick menciiĝas kiel vicprezidanto.
FLEJA nun havas 103 membrojn (inter kiuj 4 donacantoj), tiel ni rajtas je 2 TEJO-komitatanoj por la periodo 1988-89. Tiel Ilse povas kaj pretas esti TEJO-komitatanon por la koncerna periodo. Jean Pierre deponis nian membraliston de la jaro 1987 ĉe la aktuarejo de la ĉeftribunalo.

2. Estonteco:

Neniu reago venis al la rondskribado de Patrick por partopreni la ŝercpromenadon en Gento tiel ankaŭ ne eblis prijuĝi specialan premion de FLEJA dum tiu ĉi aranĝo. Ankaŭ de Kortrijk ne venis reagon por havi eblecon prezenti nian asocion. En Bruĝo verŝajne okazos boatekskurson kun Esperanta klariĝo kun la tieaj kursanoj. André kontaktos tiucele diversajn junulojn eksterbruĝajn. Ankaŭ en Bruĝo okazos progresiga kurso en septembro kaj aliĝigos junajn kursanojn al nia aranĝo en Westmalle.

3. Kongresoj:

3.1 IJK-Zagrebo: neniu reago alvenis por partopreni antaŭkongreson interŝanĝe. André ne povos partopreni la IJK-on en Zagrebo pro planota lingvokurso organizita fare de la Eŭropa Komunumo.
3.2 FEL-kongreso: ni provos okazigi FLEJA-kunvenon dum sabato la 27a de aŭgusto.
3.3 Westmalle: sabatvespere kantos Patrick Retour. Dum la tago ankaŭ okazas vidbendaj prezentoj. Patrick jam antaŭmendas kongresejon en Lokeren por 1989.
3.4 Paska kunveno en Baarle-Hertog/Baarle-Nassau: NEJ petas al FLEJA por serĉi prelegontoj.
3.5 Interkongreso IJK-UK '89: ne jam alvenis informojn de Oostende kaj de IJK-organizantoj. La 2 junulargastejoj en Oostende havas plialtajn restadprezojn dum la turisma sezono.

Fino: 12h30.

Protokolanto: Jean Pierre VandenDaele.